Johann Wolfgang von Goethe,

# Do, ni trinkadu!

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

1. Jen ni kunvenintaj kun laŭdinda vol',
Pro tio nun: do, ni trinkadu!
Tintadas la glasoj, silentas parol',
Pripensu ni: do, ni trinkadu!
Malnova ĝi estas kaj fortika dir',
Ĝi taŭgas por iu ajn plenkreska vir',
Kaj sonas eĥoe laŭ kora dezir',
Kunuloj nun: do, ni trinkadu!

2. La sorto forvokas min el via rond',
Kunuloj, ho! Do, ni trinkadu!
Foriras mi sen granda havo al mond',
duoble nun: do, ni trinkadu!
Ĉu avaregula amasas envi',
Do gajan junulon zorgigas neni',
ĉar unu l'alian ja helpas el ni:
Atestu per: do, ni trinkadu!

3. Pri la hodiaŭo, ĉu decas parol'?
Mi pensas nur: do, ni trinkadu!
Ŝanĝiĝo ja estas de l'mondo la rol',
Pro tio ja: do, ni trinkadu!
Eliras kunulo el urba pordeg',
La nuboj foriĝas pro suna la reg',
Jen ĝi la emblemo de nia ĝojeg',
Finkantu nun: do, ni trinkadu!

*Traduko de la Germana poemo "Ergo bibamus!" de* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* LUDWIG EMIL MEIER *(∗1847-02-16 – †1919).*

*Arg-85-173 (2003-11-11 19:53:40)*

*Mi, Manfredo Ratislavo (= Manfred Retzlaff), ŝanĝis en tiu versio la tradukon de Ludwig Emil Meier (= L. E. Meier) iomete anstataŭigante la latinajn vortojn "ergo bibamus" per "do, ni trinkadu!". La tradukinto L. E. Meier estis lasinta tiun latinan esprimon en sia traduko. Sed mi pensis, ke estas eble pli konvene, ke la teksto estu tute en Esperanto. Oelde, la 11-an de Novembro 2003.*